

Eduard Ebel,  
Neĝas nun ĉie ĉi

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Neĝas nun ĉie ĉi,  
lagon kovras glaci',  
brilas kristnaske arbar'.  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',  
malaperas dolor',  
venas savant' de l' homar'.  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',  
sankta nokt' estas nun,  
kantas por ni anĝelar':  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-99-199 (2003-12-11 08:30:04)*

*MR-012-3*

Eduard Ebel,  
Flustre falas la neĝ' ,

*tradukita de Josef Kühnel*

Flustre falas la neĝ'.  
Lag' rigidas laŭ leg'.  
Kristfeste brilas arbar'.  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.  
Foras ĉiu dolor'.  
Fuĝas la vivoamar'.  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'  
kaj ĉiela jubil'  
logas laŭ ĉarma fanfar':  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

*MR-012-JK-1 / Arg-99-202  
(2010-09-18 19:50:56)*

*MR-012-JK1*

Eduard Ebel,  
Milde falas la neĝ'

*tradukita de N. N. 01*

Milde falas la neĝ',  
Lago silentas en preĝ',  
Arboj en brilblanka vest'.  
Ĝoju pri kristnaska fest !

Nun varmiĝas la kor',  
Ĉesas ĉagren' kaj dolor',  
Ĝoju pri Dia ĉeest'.  
Ĝoju pri kristnaska fest!

Sankta nokto de Di',  
Vekas anĝelharon ĝi,  
Sonas ĉarmega atest':  
Ĝoju pri kristnaska fest'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905) en Esperanton de N. N. 01.*

*MR-012-NN-1 / Arg-99-201  
(2003-12-11 08:46:13)*

*MR-012-NN-1*